

REVUO

Monata Aldono al Esperanto Triumfonta.

NUMERO 1

1922

NOVEMBRO

Nürnberg, la lulilo de la Esp. movado.

De D-ro Richard Ledermann.

Same kiel kelkiu grava ideo eliris el Nürnberg, respektive ricevis ĉi tie sian decidan forton, tiel ankaŭ Esperanto enradikiĝis, plej frue el ĉiuj germanaj urboj, en la nordbavara komerca metropolo, kiu do povas pretendi honoran lokon en la historio de la mondlingva movado.

Jam Volapük, la konata eltrovaĵo de la badena pastro M. Schleyer, estis trovinta komence de la okdekaj jaroj afablan akcepton en Nürnberg, speciale en la tieaj komercaj rondoj, kiuj montris viglan intereson por tiu unua finkonstruita sistemo de mondlingvo. En 1885 sufiĉe granda aro da mondlingvanoj fondis la Nürnbergan Mondlingvan Unuiĝon, kiu sub la sindonema gvidado de Leopold Einstein estiĝis baldaŭ la centrejo de la Volapüka movado. Delonge studinte la historion de la homa civilizacio, ĉi tiu klera, altanima verkisto, spite de progresinta aĝo, kun la ideala entuziasmo de junulo ekokupis sin pri la homfeliĉiga problemo kaj estis baldaŭ ĝia plej agema antaŭbatalanto. Verkante pli ol 200 artikolojn por ĉiuspecaj ĵurnaloj kaj gazetoj, propagandante en ĉiuj grandaj unuiĝoj, migrante de urbo al urbo kaj fondante multe da grupoj, li treege prosperigis tiun movadon precipe en Sudgermanio. Kiel

unu el la malmultaj Volapükistoj, kiuj ankaŭ parole sufiĉe regis la komplikan lingvon, li ludis gravan rolon en la Volapükaj kongresoj, estis ofta kunlaboranto ĉe la ĉeforgano „Volapükabled“ kaj restadis kiel

favora gasto diversfoje en la hejmo de la elpensinto. Sciante bone la mankojn kaj malperfektaĵojn de Volapük, li tamen energie klopodis ĝin, ĉar la tiamaj novaj sistemoj ne prezentis, laŭ lia opinio, pli kontentigan solvon. En jaro 1886 ekzemple li kontraŭbatalis ankoraŭ energie la Pasingvon de P. Steiner, aldonante la signifan deklaron: „Se iam aperos io pli bona ol Volapük, kiel la unua mi proklamos ĝin; ĉar la pli bona ĉiam estas la malamiko al la bona, kaj la plej bona la malamiko al la pli bona.“



Leopold Einstein.

Neatendite baldaŭ okazis tio; ĉar jam la sekvantan jaron ekstaris danĝera konkuraĵo al Volapük: la internacia lingvo Esperanto. Ricevinte la unuan broŝuron, Einstein tuj plejgrade interesiĝis, kaj ju pli detale li okupiĝis pri ĝi, des pli bone li ekkonis la verajn esencojn kaj premisojn de mondlingvo. „La problemo de internacia lingvo,“ li skribis kelkajn semajnojn poste al la elpensinto D-ro Zamenhof en Varsovio, „estas absolute definitive solvita, kaj ĝojigite mi sendas al vi korajn gratulojn al tiu ĉi solvo. Kion mi longe

atendis, tio nun fine estiĝis. Laborante ankoraŭ por Volapük, mi diris al mi, ke la unu duono de la sistemo, la gramatiko, estas bona, sed la dua duono, la vortaro, estas malbona; sed mi timis, ke nenio perfekta povas esti kaj la unu parto devas suferi je la kostoj de la alia. Sed en Esperanto ambaŭ partoj estas bonege solvitaj, pro kio mi ekkrias kun nepra certeco: La problemo estas absolute definitive solvita. Ĉar neniam povas esti kreata pli simpla gramatiko ol en Esperanto, kaj neniu vortaro de internacia lingvo povas esti konstruata pli logika kaj sur aliaj bazoj ol en Esperanto. Eĉ se troviĝus kelkaj eraroj en tiu ĉi lingvo, ili estas tiel malgravaj, ke oni ĉiutempe povas korekti ilin, ne tuŝante la sistemon mem. Kia ajn estos la estonta mondlingvo: pri tio ne povas ekzisti iu ajn dubo ke ĝi estos nur Esperanto, ĉu en la nuna formo ĉu en formo, kiu diferencos nur en flankaj demandoj, sed ne en fundamento mem. Alia bazo ne estas elpensebla, kaj pro tio mi nun povas trankvile labori ne timante fariĝi refoje malfidela al mia principo.“

Ok semajnojn poste, Einstein eldonis sian unuan broŝuron titolitan „La Lingvo Internacia — la plej bona solvo de la internacia mondlingva problemo“, kiu malfermis, unuafoje kaj metodike prilaborite, al la verko de Zamenhof la germanlingvaj landojn. La broŝuro, pri kies publikigo pro la ĝisnunaj personaj intimaj interrilatoj la aŭtoro certe ne facile decidigis, estigis grandegan sensacion kaj nepriskribeblan konfuzon ĉe la Volapükistoj kaj kaŭzis pasiajn persekutojn kaj malamikajn de tiu flanko. Afere ne sciante kontraŭbatali la traktaĵon, oni ekbatalis la aŭtoron per riproĉoj, kalumnioj kaj atakoj plej maldelikataj. Sed neŝanceliĝe Einstein kuraĝe daŭrigis sian vojon, varbante ĉie amikojn por la nova afero kaj dissendante Esperantajn librojn. Kelkajn monatojn poste li aperigis sian duan, polemikan broŝuron „Mondlingvaj laŭtempaĵoj kaj disputaĵoj“, kiu pruvis la nekontesteblan superecon de Esperanto kontraŭ Volapük kaj, decidinte influis la lingvomovadon en Germanio. La multvalora, konciza kaj serioza traktaĵo estigis baldaŭ

pluan gravan rezulton, registreblan kiel unua venko en la historio de Esperanto. La bonreputacia, influrika „Nürnbergga Mondlingva Unuiĝo“ deklaris sin, en sia decembra ĝeneralkunsido 1888, laŭ propono de sia prezidanto Chr. Schmidt, oficiale por Esperanto kaj nomis sin de nun „Esperantista Klubo Nürnberg“. Vere memorinda fakto! Ĉar tiu klubo estis la unua Esperanto-organizado ne nur en Germanio, sed en la tuta mondo.

La graveco de tiu fondaĵo ne povas esti supertaksata. Dum la Volapüka movado, cetere jam sufiĉe malfortigita per internaj skismoj, ricevis per tio la mortigan baton, la Zamenhofa lingvo, per la aliĝo de tiu kompetenta klubo, estis proklamita en la okuloj de la tiamaj mondlingvanoj, la pli bona, sendube supera kaj nepre rekomendinda sistemo. La afero, kuŝanta ĝis nun sur la ŝultroj de unu viro, subite estis gajninta vastan, fortan bazon.

Nun ankaŭ la malnova sonĝo de Zamenhof estis realiĝonta: la spirita koncentrado de la tuta movado per fondo de centra organo. La 1-an de septembro 1889 aperis — ree unualinie merito de la nelaciĝebla Einstein — „La Esperantisto“, la unua Esperanto-gazeto de la mondo. Presate ĉe W. Tümmel en Nürnberg kaj modere redaktate komence de Chr. Schmidt, poste de Zamenhof mem, ĝi eliris ĉiunmonate, enhavante lingvaj kaj propagandajn ĉefartikolojn, tradukojn de prozaĵoj kaj poemoj kaj anoncojn de novaj Esperantaĵoj. Unuigante ĉiujn lingvistojn kaj antaŭbatalantojn, la monata ĵurnalo multege kontribuis por evolui la junan lingvon kaj pliperfektigi la lingvan sentadon de la legantoj. Laŭ statistiko el la jaro 1892, la organo havis tiam 544 abonantojn, nome 335 en Rusujo, 124 en Germanio, 56 en Svedio, 10 en Francio, 6 en Ameriko, 4 en Italio, 3 en Bulgario, 2 en Hispanio, po 1 en Anglio, Belgio, Portugalio kaj Brazilio. Same kiel la abonantoj, ankaŭ la kunlaborantoj estis plejparte rusoj kaj poloj, ĉiuj penetrataj je kortuŝa sindonemo kaj entuziasmo al la lingvo kaj ties nobla kreinto.

Krom la „Esperantisto“ ekestis baldaŭ plia grava entrepreno: la eldonado de la

„Biblioteko de la internacia help-lingvo Esperanto“. Presita ĉe W. Tümmel en Nürnberg kaj redaktita de Zamenhof mem, ĝi prezentis riĉan kolekton da multvaloraj eĉ klasikaj originalaĵoj, tradukaĵoj kaj diverslingvaj instruajoj. La du unuaj libretoj enhavis ekzemple el la plumo de la Majstro la tradukon de Hamlet, la ekzercaron kaj la grandan german-Esperantan vortaron, kiujn sekvis verkaĵoj de diverslandaj, speciale rusaj kaj polaj aŭtoroj. Ĉiu libreto entenis po 100 paĝoj en la formato 14×21 kaj kostis po 2 gmk., bagatela prezo kompare al la bonega enhavo. Kun admiro ni rigardas hodiaŭ tiujn unuajn pruvaĵojn por la literatura taŭgeco de Esperanto, samtempe dokumentojn de la granda idealismo de viroj, kiuj ne nur oferadis penojn kaj tempon, sed ankaŭ financajn rimedojn por estigi kaj daŭrigi la multekostan entreprenon.

Laŭ propaganda vidpunkto, la cirkonstancoj estis ja vere ne oportunaj por Esperanto. La malsukceso de Volapük estis malkreditiginta entute la mondlingvan ideon. La sciencistaro, estanta ja ĉiam skeptika eĉ malamika al ĉia artefarita lingvo, mokadis pri la nova lingvaĉo, eliranta ree de laikulo, kaj estanta pro tio *a priori* maltaŭga. La gazetaro malapogis la aferon, mokante pri la nekorekteblaj utopiistoj, kiuj dediĉis la multvaloran tempon al tiaj senfruktaj penadoj. La vasta publiko malkonfidis la laŭdojn de la propagandistoj, kaj eĉ iamaj entuziasmaj mondlingvanoj, malesperante pri feliĉa solvo de la problemo, retiradis sin pli kaj pli. Vere, forta kredo, firmega konfido, superhoma energio estis necesaj por kontraŭstari la amasegon de antaŭjuĝoj kaj malamikaĵoj.

Inter la malmultaj, kiuj daŭrigis kuraĝe la nedankan, lacegigan batalon kontraŭ malprogresemaĵoj, indiferentuloj kaj filistoj, Leopold Einstein staris ĉiam en la unua vico. Kvankam li jam estis kormalsana, li intencis fari, en printempo 1890, grandan propagandvojaĝon tra tuta Germanio. Sed nekompatema sorto malebligis ĉiujn liajn projektojn. Dangera malsano katenis lin al la ĉambro, doloroj kaj suferoj jam malhelpis lin ĉe ĉiu laboro. Tamen li ne forgesis sian malnovan amaĵon, kaj ne plu povante klopodi por la lingvo, li pensadis

kaj songadis pri ĝi. Komence li esperis ja ankoraŭ resaniĝon kaj ofte li skribis tiam de el la lito al siaj Esperanto-amikoj leterojn plenajn de entuziasmo: tra la suferoj de la maljunulo brilis la flamo de la junulo. Sed en la dua duonjaro li perdis ĉiun esperon kaj atendis senpacience la liberiĝon de ĉiuj doloroj per la morto. Kortuŝa estas la lasta letero, kiun li direktis al Zamenhof ankoraŭ kelkajn monatojn antaŭ sia fino. „Mi estas maljuna kaj malsana,“ li skribis, „kaj ne plu vidas la venkon de nia sankta afero; sed vi, vi baldaŭ ĝisvivos kaj vidas ĝin en plena beleco. Kaj se eble pasos multe da jaroj en batalado, ne perdu la kuraĝon kaj laboru! Nia afero venkos, kaj la kuraĝaj pioniroj rikoltos la dolĉan rekompencan por siaj penadoj.“

Multe tro frue, la 8-an de septembro 1890, mortis Leopold Einstein, la nelaciĝebla antaŭbatalanto de Esperanto kaj ĉefapostolo en la germana movado. Prave Zamenhof diris pri li, ke lia nomo estu enskribata per oraj literoj en la historio de Esperanto. Kiom decida estis iam lia aliĝo, tiom katastrofiga nun estiĝis lia ekŝiĝo. La eldonado de la biblioteko kaj la regula elirado de „Esperantisto“ ĉesis, la Esperantista Klubo silentiĝis, la Esperanto-centrejo transiĝis norden kaj okcidenten, kaj kiam eĉ idistaj celadoj enradikiĝis, ŝajnis la iama esperplena semaro pli malpli sufokiĝinta.

Feliĉe, la forta alpuŝo, kiun alportis la postmilita tempo al nia movado, revekis ankaŭ en Nürnberg la mondlingvan idealon al nova vivo. Kvin viglaj Esperanto-unuiĝoj (la Loka, Katolika, Instruista, Fürtha grupoj) kunfanditaj en la Esperanto-Kartelo Nürnberg-Fürth, propagandas kaj klopodas laŭforte kaj sukcesplene la disvastigon de la mondlingvo. Gravaj institucioj, ekz. la Komerca Ĉambro, morale subtenas Esperanton, la gazetaro simpatias nian aferon, kaj dank' al progresema urbestro Esperanto estas nun instruata en ĉiuspecaj lernejoj, i. a. en la Popolklerigaj Kursoj, en la Popola Altlernejo kaj en Komerca Universitato. Tiel Nürnberg, la iama glora Esp. centrejo, estiĝis denove fortabastiono, fierakastelo de Esperanto, inda gastigi la XV-an en siaj muroj.

Al la rememoro de L. Einstein.

Al ni Vi profetis el mond' forirante*)
Triumfon de nia komuna afero.
Profete estonton anime sentante,
Vi vidis antaŭe la venkon de l' vero!

Forflugis jararo, hodiaŭ la kvaran
Travivas jardekon ni en batalado,
La mort' maldensigis la vicon anaran
De Viaj amikoj en kunlaborado.

Metinte sur nian altaron komunan
De siaj penadoj plej noblan oferon,
La unuj ĝisvivis realon pli sunan,
Aliaj forportis kun si nur esperon

Standardon nun tenas la nova idaro.
Certec', ne espero ĝin gvidas al celo
Sur voj' kvankam staras nun ankaŭ la baro,
Haveno ridetas al ĝi tra malhelo!

Kaj jen en momento de venko proksima
Ariĝas en muroj de via naskloko
La samideana kongreso kutima,
Sed ne laŭ hazardo — laŭ kora alvoko!

De ĉiuj mokito iama junulo
De Vi la unue al kor' alpremita,
Hodiaŭ ekstaros alikreska fortulo
Por meti la florojn sur tombo merita.

Do estu proksima kongreso modesta
Al Via memor' destinita soleno,
Ĝi estos la signo — la plej manifesta
Por Vi varmiginta al venka elteno!

D-ro Leono Zamenhof.

*) L. Einstein mortante skribis al Dr. L. L. Zamenhof jenajn vortojn: „Mi jam ne vidos la triumfon de nia sankta afero, sed Vi ne perdu esperon kaj laboru; diversaj malhelpoj povas malfruigi ĝian progreson, sed nenio povas malhelpi ĝian finan venkon.“

Al nia legantaro.

La rapida kaj plena sukceso de »Esperanto Triumfonta« estas senekzempla en la historio de la Esperanto-gazetaro. Ĉefa kaŭzo de tiu sukceso estas la serioza klopodado de la presejo-eldonejo, ĉiam egaligi la elspezojn kaj enspezojn, tiel ke defcito estas evitata. Tiamaniere ni povis ne nur daŭrigi la en novembro 1920 komencitan ĉiusemajnan eldonadon, sed eĉ konstante plibonigi, plibeligi kaj pligrandigi la ĵurnalon, laŭ tiu sama mezuro, laŭ kiu la abonantaro kreskis kaj koncentriĝis ĉirkaŭ nia ĵurnalo.

Kun la hodiaŭa numero ni faras plian paŝon en la direkto al la progreso, per senpaga aldono de 8-paĝa »Revuo«. Ni ne donis al la revuo specialan karakteron, ekz. literaturan, teknikan, ekonomian aŭ alian; sed se ĝi trovos bonan akcepton ĉe la legantoj kaj se ĝi helpos pligrandigi la abonantaron, ni povos eventuale

dufoje en la monato aŭ ĉiusemajne aldoni 8—16 paĝajn revuojn kun speciala karaktero, per tio malbezoniĝante la eldonadon de specialaj gazetoj kaj ŝparigante al la Esperantistaro la elspezon de abonpago por diversaj gazetetoj per koncentriĝo ĉirkaŭ unu grava kaj serioza organo.

De diversaj flankoj ni aŭdis lastatempe alvokojn je abono al tiu aŭ tiu e'donota nova gazeto. Plej bone estos, se la Esperantistaro tute ne atentis tiajn alvokojn. Tiamaniere la eldonemuloj estos tuj kuracitaj je sia eldonemo-malsano, nek eldonontoj nek abonontoj perdos sian bonan monon, kaj nia movado ne estos maltrankviligata kaj endanĝerigata per la efemeraj organetoj, kiuj englutas jarabonojn sed aperos nur 2—3-foje. Ni ne skribas tiujn liniojn pro timo de konkurenco. Male, ju pli da malgrandaj organetoj

vegetos rezultigante deficiton kaj ĉagrenon al eldonantoj kaj abonantoj, des pli firme staros nia ET, gvidata laŭ komercaj principoj kaj subtenata per la plena konfido de la abonantoj. Sed ni agas en la intereso de la Esperantistaro, por la profito de nia movado, avertante pri la disigo de fortoj kaj mono kaj admonante je koncentrigo ĉirkaŭ nia organo.

Do, samideanoj, plenforte apogu ET kun ĝia Revuo, sed obstine malatentu alvokojn je abono al novaj organetoj, kiuj ne povos ekzisti sed foruzos valorajn

fortojn kaj monon. Zorgu per energia apogo al ET, ke ĝi povu baldaŭ aperi kun ĉiusemajna 16-paĝa revuo. Jen via kaj nia profito kaj tiu de nia tuta movado!

* * *

Ni opinias bona antaŭsigno, ke la unua numero de nia Revuo aperas samtempe kun la speciala numero de ET pri la urbo de nia venontjara Universala Kongreso. Pro tio ni disponigis ankaŭ la enhavon de la hodiaŭa Revuo ekskluzive al artikoloj koncernantaj Nürnbergon.

La veto kun la diablo.

Nürnbergega legendo.

Trad. D-ro Otto Kleider.

La legendo rakontas, ke imperiestro Konrado I-a, la fondinto de la Nürnberg'g'a imperia kastelo, ordonis konstrui kapelon ĉe la kastelo (hodiaŭ nomata la imperiestra kapelo). Pro manko je konstrumaterialo, speciale je marmoro, el kiu estis farotaj la kolonoj de la arkajaro, prokrastiĝis la konstruo. Estis okazonta la reveno de l' imperiestro el militiro kontraŭ Bavarujo, kaj la episkopo en Regensburg en la tago de lia solena eniro en la novan imperian kastelon estis inaŭguronta la kapelon.

Sed al la kastela kapelestro Patro Cyrillus, urĝanta pri la finkonstruado, la konstruestro deklaris: „Tion povos efektiviĝi eĉ ne la diablo!“

Foje dumnokte Patro Cyrillus ne povis ekdormi. Nordokcidenta ventego tiom ĉirkaŭfuriozis la kastelon, kvazaŭ ĝi estas ĵetegonta ĝin de ĝia roka fundamento malsupren sur la urbon.

Pro tio li leviĝis kaj legis sagacan traktadon pri la doktrino pri la purigejo. Intense li rememoris pri la efikoj de la diablo al malfortaj homaj animoj, sed ankaŭ pri la triumfo de la Sankta Eklezio super lia povo. Dum piaj preĝoj fine li ekdormis.

Jen en sonĝo li vidis alproksimiĝanta fumajan nubon, malfaciligantan al li la spiradon, kaj baldaŭ ŝajnis al li disvolviĝi el la nubo la konturoj de figuro, multe

similanta al la fantomo, kiun la tiama tempo kutimis imagi la majstro de la tuta malbono.

„*Apage Satanas*“, alkriegis lin la pastro. Sed, tamen alproksimiĝante, la figuro iom post iom aliĝis je simpla homo en la kostumo de la metiistoj, de la ŝtonistoj aŭ masonistoj.

Patro Cyrillus malgraŭ tio sciis, kiu estas antaŭ li. La krucifikson suprentenante, kuraĝe li demandis pri liaj deziroj. „Mi scias“, diris la dumnokta gasto, „viajn dezirojn kaj venis por plenumi ilin. Al la kapelo, kiu post malmultaj semajnoj estu finkonstruita, mankas la marmoraj kolonoj. Malgraŭ via nekredema konstruestro mi promesas, transporti ilin ĉi tien, kaj kiam reĝo Konrado estos reveninta, vi povos celebri solenan meson en la finkonstruita kapelo.“

„Kaj kion vi postulos por tiu ĉi servo?“ demandis Cyrillus. „Nature nenion alian ol mian animon!“ li aldonis. „Tiu ĉi negoco neniam povos efektiviĝi, ĉar mia ĉiela parto apartenas al pli granda potenculo ol estas vi. Forlasu min, Satano!“

„Se foje mi ekinterrilatas kun pastro,“ grimacis la diablo, „anticipe mi scias, ke li faros ĉiuspecajn cirkonstancojn kaj ŝercojn, ĝis kiam ni interkonsentos; sed kontrakto fine tamen efektiviĝos, kaj vi fakte ne estus la unua, kiu cedis al tia. Mi scias ke vi estas taŭga pastro, kaj ke

vi ne rifuzus, dum kvarona horo celebri meson, por kio alia bezonus la duoblan tempon. Pro tio ni vetu unu kun la alia! En malnova ruiniĝinta templo en Romo mi scias kvar kolonojn el plej bela Karara marmoro. Tiujn mi transportos unu post la alia ĉi tien por via kapelo, kaj se vi estos fininta vian meson, mi rezignos pri ĉiu ajn rekompenco, sed se eble vi ne estos fininta, kiam mi alvenos ĉi tie kun la kvara, via animo apartenos al mi. Ĉu ne fakte tio estas malkara? Sed antaŭ la unua koka krio ĉio devos esti plenumita. Ne pli multe mi havas da tempo.“

Patro Cyrillus silente opiniis, tion mi povus riski ĉiuokaze; kion scias la diablo pri mescelebrado? Kaj krom tio la karaj ĉielaj anĝeletoj mem devus ridi, se la malbonulon mi instigus por tio, sen ĉiu rekompenco fari diplaĉan faron kaj partopreni la ornamon de la kapelo. Nelonge do meditinte li diris: „Jes, mi konsentas al la veto, mi aranĝos ĉion por la sankta ago kaj venigos kelke da helpantoj. Sed ne pli frue vi havos permeson foriĝi, ol ĝis kiam mi komencos la meson.“

„Mi estas kontenta je tio“, respondis Satano, „sed vian *Hokus Pokus' on* ĉi tie mi ne deziras rigardi; dum tio mi eksidos sur la turo supro, kaj kiam via sonorileto signalos la komenciĝon, mi forveturos al Italujo.“

Patro Cyrillus konsentis, kaj venante el la kastela gardejo kun kelke da dungitoj, kiuj jam pli frue servis kiel helpantaj knaboj ĉe multaj mesoj, li vidis la diablon bonhumore sidanta sur la supro de la „idolana turo“, kaj per larĝaj ungeghavaj vespertaj flugiloj batanta la aeron, tiel ke la muĝado de la ventego estis neniigata. El la sudo grava fulmotondro alproksimiĝis, kaj jam kelkaj fulmoj zigzagis tra la nigrega nubaro. La pastro preparis la altaron, kaj kiam li metis sur ĝin la hostivazon, terura ektondro trasonis la preĝejon, lumigatan per la fulmoj, tiel ke oni preskaŭ opiniis, ke krevis la fundamentoj de la kastelo. Ĉiuj ektimis, sed Patro Cyrillus ordonis sonorigi la sonorileton de la kapelo. Kiam li alpaŝis la altaron, kaj la unua sono tratremis la aeron, ekestis timigaj siblado kaj muĝado, unu fulmo sekvis la alian, senĉese tondris,

kaj la fenestrojn de la kapelo preterflugis nigra ombro. Tio estis la malbonulo, kiu ekkomencis sian vojaĝon kaj kies flugiloj tuŝetis la rondajn vitrojn de la fenestroj, tiel ke multaj disrompiĝis kaj la vitraj eroj surfalis la altaron.

Trankvile, ne atentante ĉion ĉi tion, Patro Cyrillus komencis sian pian agadon, sed kiam li atingis la *Confiteor*, la diablo jam revenis kun la unua kolono. Ankoraŭ apenaŭ komenciĝis la *Offertorium*, jen ankaŭ la dua kolono tiom regule staris ĉe sia loko, kvazaŭ la plej bona ŝtonisto ĝin metis. Nun la Patro fakte malkuraĝiĝis, kaj kiam li eksonigis la *Sanctissimum* kaj la sonorileto de la helpantoj anoncis la sanktan aliformiĝon, la ventego tiom timige ĉirkaŭploregis la kapelon, ke pastro kaj servantoj apenaŭ povis restigi sin sur sia loko. Cyrillus sentis sin tiom blindigita per la brilo de la fulmoj, ke la vortoj de la *Missale* dancis antaŭ liaj okuloj. Nun dum la *Communio* li vidis, ke ankaŭ la tria kolono apud la altaro jam ornamis la kapelon. Senkonscie la dungitoj kuŝis sur la planko, sed Cyrillus sin turnis ĉe la altaro, benante etendis la manojn, kaj lia potenca voĉo superis la ploregadon de la ventego, kiam li kriis: „*Dominus vobiscum! Ite missa est!*“


Sed dum la lasta vorto la kapelan pardonon traigis kolosa fajra garbo, kaj okazis terura krakado, kvazaŭ ruiniĝus la arkaĵaro de la kapelo. Cyrillus falis sur la ŝtupojn de la altaro, la kandeloj estingiĝis, densa mallumo estis ĉirkaŭe, nur ankoraŭ por momentoj interrompata de tremantaj fulmoj.

En la kastelo dume ĉiuj estis viviĝintaj. Gardistoj kaj servistoj alrapidis kaj trovis sur la planko la pastron kaj la altarservantojn ŝajne senvivaj. Sed samtempe la pli frue ne ekzistantajn marmorkolonojn ili ekvidis suprenstarantaj al la plafono de la kapelo kaj centre de la planko kuŝanta la kvaran, disrompitan je du partoj.

Nur kiam la kokoj de malsupre el la urbo anoncis la alproksimiĝantan matenon, oni sukcesis revivigi la senkonsciulojn, sed Patron Cyrillus la timiga dumnokta okazintaĵo daŭre melankoliigis. Lia konfeso de la fatala veto kun la diablo sufiĉe klarigis la aferon krom la fino de la

aventuro, kiom tio rilatis al la disrompita kolono. Sed oni ne bezonis multe da fantazio por trovi, ke la trompita diablo la kvaran kolonon alportis en tiu momento, kiam Patro Cyrillus, kiu finante ne plu sufiĉe akurate plenumis la tekston de la *Missale*, kriis la *Ite missa est*, kaj kolerige pri la perdo de la veto kaj de la pastra animo, tiom perforte ĵetis la kolonon sur la plankon, ke ĝi disrompiĝis en du partoj.

Ankoraŭ hodiaŭ oni povas konvinkiĝi, ke el la kvar kolonoj de la kapelo la unu meze estas ĉirkaŭita de ringo. Kaj barbhava homa kapo, kiun oni konsideras monaĥa kapo, troviĝas ĉe la ŝtona galerio



La kvinangula turo.

de la imperiestra loĝio.

La solena inaŭguro de la kapelo flanke de la episkopo de Regensburg povis okazi nur post la reveno de la imperiestro. Sed pro la malpia kuraĝego fari veton kun la eterna malamiko de la kristanaro, Patro Cyrillus estis punata per tio, ke li pilgrimu al Romo kaj mem petegu de la Sankta Patro absolvon de tia grava peko. Tiu, prave konsiderante la bonan celon, kiun celis Patro Cyrillus, ne hezitante plenumis la peton, tiel ke la kuraĝa piulo plenposedante sian antaŭan gajan humoron revenis kaj, kiel kastela pastro de Nürnberg, ĝis sia granda aĝo ĝuis la favore de la reĝo Konradokaj de lia sekvinto Henriko.

Nürnbergga Somervespero.

De Helene von Forster.

En la fenestroj de la kastelo speguliĝas la radioj de la subeniranta suno. Bonodoro eniĝas de el la kampoj, aparta akreta odoro same kiel de multaj arbaraj beroj. Ĝi venas el la vaste etendiĝanta Imperia Arbaro kaj miksiĝas je la varma aero supreniranta el la malnova ŝtonaro, sur kiu kuŝis la suno la tutan tagon. Ĉirkaŭ la domanguloj saltadas la infanoj, ridante, kriante kaj disputante, kiuj ricevis la „lastan“ (t. e. la lastan baton) sur la dorson antaŭ ol iri hejmen. En la mallarĝa, praantikva strateto, kondukanta de la Bestĝardena Pordego al la Kastelo, la homoj sidas antaŭ la domoj sur la elpaŝitaj ŝtupoj, la virinoj trikante, maljunaj viroj havante la pipon en la buŝangulo, ŝovinte la ĉapon forte antaŭen sur la blanka kapo, tiel ke la ŝildo preskaŭ kovras la okulojn. Ili interbabiladas pri la okazintaĵoj de la tago je malfuŝita dialekto. Ili ridas kaj babil-

adas. Kelka maljuna okulo ekbrilas fripone; ĉar tie ĉi inter la loĝantoj de la malgrandaj stratetoj la Nürnbergga sprito havas ankoraŭ lokon. El la butiko kun la aĉa sonorilo eliras la vendistino, streĉante per ambaŭ manoj la grandan larĝan blankan antaŭtukon, interplektante la brakojn kaj aŭskultante. En la pordo, antaŭ kiu pendas la ŝanceliĝada latuna ŝildo, staras la barbisto, enĵetante intertempe en la babiladon ŝercaĵojn ridege akceptatajn. Kudristino, loĝanta en la teretaĝo, profitas ankoraŭ la lastan taglumon, malfermante vaste la fenestretojn de sia loĝejo kaj ŝovante la kudromaŝinon antaŭen rekte antaŭ la fenestrobretton, kaj „kudras kaj kudras konstante“. Infanoj apogassin sur la breto rigardante ŝian laboron. El sia metiejo paŝas la selisto, kiu faras la brid-aĵojn por la malgrandaj lignaj aŭ felumitaj ĉevaloj paradantaj en la ludaĵmaga-


zenoj. Kiam la pordo de lia metiejo vaste malfermiĝas, la rigardantaj etuloj forsaltas de la kudrulino, alkurante kaj provante vidi scivoleme en la sanktejon. Sed estas jam tute krepuske. La kudristino ekbruligas la lampon, la infanoj estas endomigataj, la selisto kun la leda antaŭtuko iras malrapide kaj singardeme al gasteja ĝardeneto, enŝovita inter la altaj antikvaj mallarĝaj domoj. Ĝi konsistas el nur tri arboj. Tie kolektas sin ĉirkaŭ la kutima tablo la metiistoj de la strateto, la selisto, la kombilisto, la sonorilisto. La sonorilisto loĝas en la alta larĝfenestra domo en la teretaĝo, tra kies vitraĵoj oni vidas ĉiumezurajn latunajn sonoriletojn, metitajn sur la ligna bretaro. Ekzistas jam nur tre malmultaj sonorilistoj en Nürnberg, loĝantaj en la mallarĝaj malgrandaj stratetoj.

Manveturiletoj brukrakas sur la malebena pavimo. Etulo kun malgranda harega blondkapo, kun suprenigitaj ĉemizaj manikoj kaj malhelverda antaŭtuko ĉirkaŭ la kokso, tiras ĝin tra la strateto. „Nun, Geoĉjo,“ oni akceptas lin, „kien vi ve-

turas?“ „Bareleton da bovbuŝega salato mi devas alporti ankoraŭ al sinjoro Sölg“, redonas la malgranda lernisto. „Ne faru tian bruon je la ekiĝinta nokto“, vokas la unua parolanto. „Diru al mia majstro, ke li faru kaŭĉukon al mia veturilo!“ ridas la lernisto, kaj la veturileto forkrakas.

Sur la rondan tablon, kiun la metiistoj ĉirkaŭsidis, lampo estas metata. Ĉie en la altaj, mallarĝaj domoj ekfulmas lumoj. Agrabla oportuneco malsupreniĝas sur ĉiujn personojn, kiuj sidas ankoraŭ antaŭ la domoj sur la antikvaj elpaŝitaj ŝtonoŝtupoj. Vera sentado de senlabora vespero! Tiuj ĉi karaj malgrandaj praantikvaj stratetoj, al kiuj la ondoj de la urbego rompiĝas! Kiam la Nürnberganoj elmigras kaj sentas poste hejmveon je la antikva urbo, tiam ili revadas certe pri tiuj ĉi angulaj malgrandaj stratetoj kun iliaj altaj, mallarĝaj domoj, iliaj elpaŝitaj ŝtonoŝtupoj, ilia infanbruo kaj ilia laborfina vespera sentado. La karaj, praantikvaj stratetoj...!

Trad. *Wilhelm Reiner*.



Ronda turo sur la kastelo.